

La Riverego

Somero de 1999

Esperanto-Societo Kebekia

N^o55^o, Jaro 14^o

Albert Saint-Martin (1865-1947)

Michel Clément

Écrire et faire de la recherche sur le mouvement espérantiste québécois du début du siècle, n'est pas une mince affaire précisément à cause de multiples difficultés documentaires. On peut alors compenser, dans ce cas précis, et lire le livre de Claude Larivière (*Albert Saint-Martin, militant d'avant-garde (1865-1947)*, Editions coopératives Albert-Saint-Martin, Montréal, 1979) sur les activités politiques de Saint-Martin, mais il manque beaucoup d'informations sur ses activités espérantistes puisque nous n'avons pas la collection complète de la revue *La Lumo* entre 1904 et 1950 (il est d'ailleurs possible que *La Lumo* ait cessé de paraître après 1904, pour reprendre beaucoup plus tard sa publication, vers la fin des années 50).

Nous savons que des bridages fascistes ont détruit, en 1935, les archives de l'Université ouvrière que Saint-Martin avait contribué à fonder en 1925, ce qui peut expliquer les difficultés que nous rencontrons. Larivière écrit qu'il a

même été difficile pour lui de récolter des informations de la famille de Saint-Martin à cause de la réputation sulfureuse de ce dernier. Nous savons, d'après les renseignements obtenus de SAT et M. Meyer (Internacia Esperanto-Muzeo), que Saint-Martin n'aurait pas adhéré à SAT, malgré ses convictions de gauche, et qu'il n'aurait pas assisté à d'autres UK que celui de Boulogne-sur-Mer en 1905.

Albert Saint-Martin et le mouvement espérantiste

Albert Saint-Martin fut un des espérantistes les plus actifs à Montréal entre 1902 et 1904. Après ces années, nous savons, par le livre de Larivière, qu'il avait conservé un attachement au mouvement mais nous n'avons, jusqu'à maintenant, aucune preuve d'activités organisées de sa part après 1904. Entre 1902 et 1904, il fit de nombreuses conférences, enseigna l'espéranto,

Saint-Martin fut un des espérantistes les plus actifs à Montréal entre 1902 et 1904.

Des bridages fascistes ont détruit les archives de l'Université ouvrière que Saint-Martin avait contribué à fonder.

fonda une maison d'édition, etc. Il a financé *La Lumo* pendant ces deux années et a écrit de nombreux articles,

dont une proposition de réforme de l'orthographe de l'espéranto, avec son ami, A. P. Beauchemin (1869-1952), sténographe à la Cour.

C'est ce dernier qui lui aurait appris la langue universelle dont il aurait, lui-même, reçu les premières leçons de l'abbé Solis.

Albert Frédéric Rambert dit Saint-Martin est né le 1^{er} octobre 1865 dans le quartier ouvrier Hochelaga, à Montréal. Son père, Joseph Rambert, pratiquait le métier de charpentier, et sa mère s'appelait Ursula Sara Jacques ; ils eurent deux fils et quatre filles. Albert Saint-Martin se maria à Emma Marie Dufresne (1863-1934), de laquelle il se sépara entre 1915 et 1916 ; de leur mariage naquit deux enfants, Théode (1888-1952) et Berthe (1891-1980). Nous mentionnons ces derniers puisqu'ils ont joué un rôle actif, et cela très jeunes, dans le mouvement espérantiste : Berthe avait appris

suite...

...Albert Saint-Martin...

l'espéranto très tôt et assistait aux réunions du *Virina Klubo Progreso* ; de plus, c'était elle que l'on avait choisie pour illustrer la première page de la revue *La Lumo*. Théode fut secrétaire du *Klubo Progreso* et aurait peut-être, comme sa sœur, assisté au premier Congrès universel en 1905. Saint-Martin a été toute sa vie sténographe à la Cour supérieure ; en plus de perdre la foi vers 1895, ce qui n'était pas une mince affaire dans un Québec catholique et conservateur, il était un militant socialiste très actif.

Comme nous l'avons mentionné, en 1905, il a assisté, avec sa famille et Pierre Beauchemin, au premier Congrès universel ; Beauchemin et Saint-Martin aurait été nommés au Comité linguistique formé par le congrès. Larivière mentionne aussi que Saint-Martin, lors d'une réunion socialiste, en 1906, aurait fait un discours en français, en anglais et en espéranto. Il fonda aussi une coopérative afin d'aider les ouvriers pauvres et les chômeurs de son quartier ; il la nomma la coopérative *Esperanto*.

On a ignoré pendant très longtemps ses multiples activités espérantistes et politiques ; il mourut en 1947 et sa famille l'inhuma, à cause de son athéisme avoué et déclaré, dans le cimetière protestant Hawthorne-Dale situé à Pointe-aux-Trembles, entre un immense chêne et quelques grands érables.

Ĝenerala kunsido

La ĝenerala kunsido de la Esperanto-Societo Kebekia okazos dimanĉon 29^{an} de aŭgusto de 1999, ĉe la restoracio *La Boulange du Commensal*, 5043, strato Saint-Denis (metrostacio Laurier), en Montrealo, ekde la dekunua (11^a) horo.

Tagordo

0. Malfermo ; elekto de kunvenestro kaj de protokolanto ; akcepto de la tagordo ; akcepto de la protokolo de la lastjara kunsido.

1. Raporto de la estraranoj.
2. Elekto de **nova estraro**.
2. Venonta agado.
3. Fermo.

Photocopie

Nous vous offrons nos excuses quant à la piètre qualité de la reproduction de la dernière édition de *La Riverego*. Le préposé à la photocopie a commis une erreur, et le rédacteur a jugé qu'il était trop tard pour reprendre la photocopie. En compensation, la reproduction de cette édition devrait être gratuite.

Kopiaĉo

Bonvolu pardoni nin pro l' malbona kvalito de l' fotkopiado de l' lasta numero de *La Riverego*. Fuŝis komizo de l' fotkopiado, kaj la redaktanto juĝis, ke estis tro malfrue, por refarigi la kopiadon. Kompense, la kopiado de tiu ĉi numero estu senpaga.

La *Rondo Familia*, dont le rôle est de servir de lien entre les familles et les générations, réunissant les familles espérantistes ayant de jeunes enfants, et qui par conséquent participaient traditionnellement moins aux activités espérantistes, a désormais un nouveau responsable. Il s'agit d'Amri Wandel, astrophysicien israélien et père de trois enfants trilingues (hébreu, espéranto et anglais) et âgés de 5 à 14 ans.

La *Rondo* a évidemment besoin de volontaires et de fonds... [*Interredaktore*]

La Riverego (Le fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopie à 110 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotkopiita 110^{exm} sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo : kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / limdato por la venonta numero : 1999.09.01.

Rédacteur / redaktis : Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / kunlaboris al ĉi tiu numero : Suzanne Bolduc, Michel Clément, Normand Fleury kaj Zdravka Metz. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K. : Normand Fleury (président / prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président / vicprezidanto), Jessy LaPointe (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Zdravka Metz kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux
Montréal Québec H2G 2R8

Répondeur et télécopieur / telefonrespondilo kaj telekopiilo: (514) 272-0151

LaRiverego@esperanto.nu

<http://www3.sympatico.ca/esperanto>

Izraelio

Bredado laŭ la ritmo de la Sankta Skribo

Maryvonne Robineau

Un extrait du livre *Ili vivis sur la tero*. On raconte ici un séjour dans un des rares kibboutz religieux orthodoxes d'Israël.

Por ke la bibliaj leĝoj kongruu kun la bredado, la religiaj kibucoj montriĝas elturniĝemaj.

Vendrede vespere ĉe la kibuco Ein Zurim, ĉiuj klopodas por digne akcepti la ŝabaton : oni alivestiĝas, la domoj estas puregaj, oni fumas la lastan cigaredon, oni programas la horloĝojn, kiuj ekfunkciigos la elektron, la virinoj akurate finkuiras la kukojn por la semajnfino. Jen aperas la ŝabata stelo : neniun laboro ĝis paso de 24 horoj. Nek kuiri, nek skribi, nek lavi, nek fumi, nek telefoni, nek vojaĝi, nek ekbruligi fajron aŭ ŝalti la lumon.

Ein Zurim estas unu el la dek ses religiaj kibucoj en Izraelio kaj, ĉirkaŭataj de siaj ses infanoj, Ester kaj Ŝmulik akceptas nin en sia hejmo. Antaŭ ol iri al la manĝosalono komuna al la tuta kibuco, Ester antaŭzorgas doni al mi fulardon por ŝirmi miajn harojn kaj Bruno kapvestas sin per kipo, la judara ĉapeto. « Por ne ŝoki iujn personojn », ŝi precizigas. Post la vespermanĝo, niaj gastigantoj montras al ni kiel meti la vazaron en la lavkuvojn disigante tiujn kiuj entenis viandon disde tiuj, en kiuj estis servitaj la fromaĝoj. Efektive la juda tablo apartigas la karnajn manĝojn de tiuj, kiuj konsistas el laktaĵoj, starigante inter ili limon laŭ la jena principo : « Ci ne kuiras la kapridon en la lakto de ĝia patrino » (Eliro 23,19).

Tiel, la tutan vivon de la enloĝantoj de Ein Zurim reguligas la bibliaj instruoj. « Ni kredas, ke ĉio estis skribita de la rabenoj en la Talmudo kaj ni devas observi ĝiajn leĝojn se ni volas vivi kiel judoj obeantaj Dion » klarigas Schmulick. Publikigita en jaro 999 a.K. en la religiaj akademioj de Babilono, la Talmudo regas ĉiujn

aspektojn de la ĉiutaga vivo. Tiel same ĝi traktas filozofion, kiel la edukadon de l' infanoj.

Antikvo kaj moderno

Iuj izraelianoj riproĉas al la religiuloj, ke ĉi tiuj same vivas kiel antaŭ dumil jaroj. Unuavide, fondita en 1946, la kibuco Ein Zurim kun sia moderna uzino, siaj hangaroj ŝirmantaj agrokulturan materialon ultraperfektigitan kaj siaj agrablaj dometoj ĉirkaŭataj de ĝardenoj, neniel aspektas kiel vilaĝo el la biblia epoko. Ĉirkaŭ kvincent personoj venintaj de dudek kvin landoj komune vivas tie, egalece dividante siajn havaĵojn kaj la fruktojn de sia laboro.

Sed ne ĉiam estas facile kombini la leĝojn de la Talmudo kun la postuloj de la moderna ekonomia vivo. Tiele la ŝabato starigas kelkajn problemojn al la agrokulturistoj. Forpuŝante ĉian ajn zorgon, la homo devas dediĉi tiun tagon al sia Dio, al sia familio, kaj ĉia

ajn laboro estas malpermesata. Sed se povas atendi la tero, la bestoj bezonas zorgadon. Kaj la tricent bovinoj de Ein Zurim ne estas escepto, necesas ilin melki kiel kutime, po tri fojojn tage.

« Kompreneble, ni melkas la bovinojn dum la ŝabato ĉar la Talmudo preskribas ne lasi suferi la bestojn, sed tion ni faras laŭ maniero konforma al la Leĝoj ». Por la melkado, la agrokulturistoj renkontis problemon pro la fakto, ke al ili estas malpermesate premi ŝaltilon por produkti elektron. Tial ili ekipis sin per programeblaj horloĝoj kiuj ĝustatempe startigas la melkomaŝinojn kaj aŭtomate haltigas ilin.

« Ĉiun virseksan unuenaskiton de cia bovino aŭ de cia ŝafino ci dediĉos al cia Dio, Javeo. Ci ne laborigos la unuenaskiton de cia bovino. Ci manĝos ĝin kun cial samhejmanoj... » Tiel parolas la libro de la Readmono (15,19) en la Biblio, por sciigi al la homo, kiu

sekvo...

La Finlande, centre mondial de la culture espérantiste en 2000

Anna Ritamäki

La *Kultura Esperanto-Festivalo*, la fête de la culture espérantiste originale, se déplacera de la Suède et du Danemark vers la Finlande. KEF 2000 aura lieu en août prochain près de Helsinki. En 2000, cette ville sera d'ailleurs l'une des capitales culturelles de l'Europe.

La musique, la littérature et le théâtre sont les grands domaines de la culture espérantiste originale, dont nous nous promettons d'explorer toutes les facettes. Le programme vous fera vivre notre culture, par ses ateliers et ses

présentations. Un cinéma espéranto, une discothèque espérantiste, des concerts de musique rock ou acoustique, des cercles littéraires, des lectures publiques et des conférences, des représentations et des exercices théâtraux, ne sont que quelques éléments de ce que l'on pourra vivre pendant cette semaine.

La culture espérantiste pour enfants et le bien-être des jeunes participants recevront une attention particulière. [Trad. *La Riverego*, selon *Interredaktore*]

La Riverego 3

La diligence et l'autoroute

Jean Marin

Tout esprit cultivé ne peut être qu'affligé de voir nos autoroutes envahies par ces véhicules sans histoire, sans passé, et sans aucune référence culturelle que sont les automobiles modernes. Faites de pièces et de morceaux, venues de cinq, dix ou vingt usines différentes, assemblées mécaniquement par des robots, méritent-elles le culte qui leur est voué ?

Pensons aux belles diligences d'autrefois, façonnées amoureusement, à la main par des artisans légitimement fiers de leurs créations, diligences tirées par le cheval, la plus belle conquête de l'homme. Ce cheval

au passé prestigieux, aux ancêtres chargés d'histoire : Centaure, Pégase, Bucéphale, chevaux des grottes d'Altamira, des fresques égyptiennes, de Mazeppa et d'Attila, de Venise et de Marly, de Verrochio et Degas...

Le cheval est un moyen de transport tout chargé de culture, et il est scandaleux de le voir abandonné au profit de ces chevaux mécaniques, sans histoire et sans âme, qui prolifèrent impunément sur nos autoroutes.

Heureusement, Dieu merci, les autoroutes de l'information restent encore... (mais pour combien de temps ?) protégées de ce méprisable

souci d'efficacité qui a fait abandonner le cheval de la culture et de l'histoire, pour le cheval vapeur (ou plus exactement le cheval diésel...)

En effet, aujourd'hui, cette bonne vieille diligence, héritée de Shakespeare, l'anglais pour ne pas le nommer, est omniprésente sur les autoroutes de l'information.

Aussi mal adapté comme moyen de communication international sur les autoroutes d'Internet, que la diligence sur les autoroutes d'Europe, par sa phonétique impossible, ses anglicismes aussi nombreux qu'énigmatiques, sa syntaxe, et sa grammaire beaucoup plus redoutable qu'une connaissance superficielle ne le laisse supposer, l'anglais, diligence linguistique des routes de l'information règne encore, sur les autoroutes de la communication.

Mais un instrument de communication infiniment plus moderne et mieux adapté à ce rôle commence à s'y tailler une place sans cesse grandissante.

Selon des études récentes, l'espéranto serait en progression constante et de plus en plus marquée sur Internet.

Lorsque le phénicien régnait en maître sur la Méditerranée, qui eût parié sur le grec ?

Lorsque le latin était parlé dans toutes les universités d'Europe... qui eût parié sur le français ?

Lorsque le français était la langue de toutes les élites, de Frédéric de Prusse à Catherine de Russie, qui eût parié pour l'anglais ?

L'anglais ayant sévi dans toutes les colonies de l'Empire britannique, et sévissant aujourd'hui sur le Marché international, qui oserait parier sur l'espéranto ?

Les mêmes qui, hier, croyaient à l'avenir des chemins de fer, de l'aviation, du téléphone, de la radio, de l'informatique... croient aujourd'hui à

suite à la page 6

...Izraelio...

plugis, semis, kultivis kaj fieras pri sia rikolto ke, sen Dio, nenio el tio eblas. Sed ĉiujare en la stalo de Ein Zurim naskiĝas preskaŭ cento da unuenaskitaj bovidoj. Kion fari el ili ? La rabenoj trovis solvon : la bovinoj, kiuj naksos sian unuan bovidon en la jaro, estas fiktive venditaj al araba najbaro (ĉi tiu ricevas monsumon por efektiviĝi la « negocon »). Ili restas en la kibuca stalo, sed ne plu estas submetataj al la talmudaj leĝoj.

« Pesah », la Pasko, estas unu el la gravaj momentoj de la juda vivo, memoriganta la Eliron el Egiptio de la izraelidoj, sub gvidado de Moseo. Tiun semajnon antaŭas intensa purigado de la domo por kontentigi la absolutan postulon de pureco dum la festo. Dum sep tagoj, oni konsumos nur panojn sen gisto, ne fermentitajn, simbolo de la renoviĝo kaj de la liberigo. Ĉar la bestoj devas esti regataj de la samaj reguloj, la melkadejo estas ĝisfunde purigita kaj oni malaperigas ĉiun spuron de tritiko el la nutrado de la bovinoj. « Iom post iom ni anstataŭigas per maizo, komencante la transiron ĉirkaŭ tri semajnojn antaŭ Pesah kaj grade revenas al la normala nutromaniero. Tiu ŝanĝo de la nutrado

de la bovinoj ofte okazigas malaltigon de la lakto-produktokvanto. El tio ni perdas monon sed tio estas la prezo, kiun ni konsentas pagi por vivi harmonie kun nia kredo » klarigas Ŝmulik.

Ĝisfunde frontantaj la teknikon kaj la rendimenton, ili tamen neniam forgesas la vivregulojn de siaj praavoj, akordigante spiritan vivon kaj laboron : iliaj tagoj ĉiam komenciĝas kaj finiĝas en la sinagogo.

La kibucoj

Dum la unua kibuco estis fondita en 1910, ekzistas nuntempe 270 kibucoj nombrantaj de 40 ĝis pli ol 1 000 membrojn. 130 000 personoj, nome 2,6 % de la totala loĝantaro de Izraelio, elektis tiun komunuman vivmanieron. El ili, nur 16 kibucoj (nome 8 000 personoj) estas religiaj kibucoj kiel Ein Zurim, postulante de siaj membroj ortodoksan kultobservon.

Por scii pli pri tiu eksterordinara aventuro, unu libro : *Ili vivis sur la tero — Ok jaroj da migrado ĉirkaŭ nia planedo*, 240 paĝoj — 8 paĝoj kun koloraj bildoj. Havebla ĉe la Libroservo de KEA (sama adreso kiel ESK).

Esperanto kaj la gazetoj

Harald Schicke

Un espérantiste et journaliste allemand se plaint du peu d'empressement qu'ont les associations espérantistes de communiquer avec les médias.

Esperantistoj ofte plendas pro la ignorado pri Esperanto flanke de la gazetaro. Ankaŭ mi tiel faris, sed mi devis konstati ke la esperantistoj evidente mem kulpas pri tio.

Mi abonas <<http://www.paperball.de>> kiu liveras aktualajn informojn laŭ la deziroj de la uzantoj (pri germanlingvaj ĵurnaloj). Pri Esperanto neniam aperas informo, kvankam UK en Berlino proksimiĝas.

Antaŭ eble unu jaro mi riproĉis iun ĵurnalon, ĉar ĝi ja raportis pri la kongreso de 200 instruistoj pri la latina lingvo (kiuj provis babili latine), sed ne pri la 15^{oble} pli granda UK. Oni tuj respondis al mi: *Oni ne sendis informojn al ni, tial ni ne raportis. Se vi sendus informojn, ni kompreneble publikigus ilin same kiel ĉiujn aliajn.*

Antaŭ kvar jaroj vizitis min japana esperantistino. Mi tuj telefonis al loka ĵurnalo. Venis ĵurnalistino, fotis, demandis, ĝuis verdan teon ktp. Aperis grandega artikolo kun tri fotoj sur la titolpaĝo kaj la lasta, kiujn oni kutime taksas la plej gravaj. Ŝi eĉ multe dankis min pro mia informo.

Post tiu sukceso mi telefonis al Hamburga Esperanto-Societo, kiun ni poste komune volis viziti pro la Zamenhofa festo por instigi ke ili ankaŭ kontaktu ĵurnalistojn. Kion oni respondis? *Ni jam dum la lastaj jaroj kontaktis ĵurnalistojn, sed tio ne alportis rezultojn. Tial ne indas provi.*

Kiam oni sendas informojn al gazetaro aŭ telefonas tien, oni kompreneble ne havas garantion, ĉu ili iam aperos en la ĵurnalo, sed se oni neniam sendas, tute certe neniam ĝi aperos.

Hodiaŭ telefonis al mi ĵurnalisto serĉanta aktualajn informojn pri UK. Mi ne povis helpi al li, ĉar nek UEA nek GEA aŭ LKK servas aktualajn informojn. La paĝoj de LKK almenaŭ

ne plu troviĝas ĉe *geocities* kun malplaĉa varbado, ili nun estas pli belaj, sed ne pli aktualaj ol antaŭ unu jaro.

Ekzistas tiel nomata *esperanto informationsdienst* (eid; informa servo pri Esperanto), kiu eĉ havas interreto-paĝon (<http://home.t-online.de/home/Ulrich.Matthias/eid.htm>), sed la plej nova (kaj sola) informo estas 1/1998.

Mi proponis mian kunlaboron pri publikaj rilatoj por UK. Mi ja estas profesia ĵurnalisto (mi havas oficialan licencon) kun rilatoj. Por mia propra eldonejo mi abonas iun servon, kiu disdonas gazetarajn informojn. Mi ofertis tiel ankaŭ disdoni (senkoste por GEA) informojn pri UK en Berlino, sed oni tute neglektis mian oferton. Eĉ mi ofertis verki informojn, se mankas aliaj

aŭtoroj.

Tamen estas mia (ĉu misa?) kredo, ke tiaj informoj ne venu de unuopulo, sed de iu organizo. Alikaze ĉiu ajn esperantisto sendus ĉiun ajn informon al gazetaro. Necesas kunordigo de UEA, GEA aŭ LKK. Alikaze eĉ kontraŭaj informoj povus esti sendataj al ĵurnaloj.

Sed tio ne estas riproĉo al tiuj homoj, kiuj uzas multe da tempo por Esperanto. LKK estas tre okupata, UEA plendas pri la tro altaj kostoj de aktualaj interreto-paĝoj. Tio nur estas instigo estonte pli pensi ne nur pri la bona organizado de iu kongreso, sed ankaŭ pri aktuala informo pri ĝi al neesperantistoj. Alikaze oni konkludus denove: venis 3000 esperantistoj el 70 landoj, sed neniu neesperantisto eksciis pri tio. [El *Interredaktore*]

Une lenteur du tonnerre !

On connaît bien le *Pasporta Servo*, service d'hébergement gratuit de la *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo*. Il existe un second service du même type, l'*Amikeca Reto*, dont l'édition 1999-2000 vient juste de sortir. Elle regroupe plus de 400 adresses dans 40 pays, dont quatre nouveaux: la Macédoine, le Bénin, les États-Unis et l'Algérie. L'*Amikeca Reto* vise plus que l'hébergement; le réseau veut que ses utilisateurs apprennent quelque chose de la région, du métier ou des intérêts de leur hôte, de manière à dépasser le simple tourisme. Un dossier complet est d'ailleurs réservé au *tourisme lent*.

Chaque exemplaire coûte dix euros. [Selon un communiqué.]

Korea ret-radio

MA Young-tae

Ĉu vi iam volis aŭdi fremdlandajn novaĵojn en Esperanto? Ĉu vi iam volis aŭdi belajn esperantajn kantojn en interreto? Aŭ, ĉu vi iam volis propagandi Esperanton pli efike kaj pli aktive? Se jes, bonvolu viziti mian radiostacion, nomata Esperanto-Radio Interreta (ERI). La adreso estas <<http://esperanto-radio.net>>. [El *Interredaktore*]

Le *Trophée d'Or* 1999 de la **dictée de Pivot** a été gagné, en catégorie professionnelle, par André Cherpillod, professeur, membre de l'Académie d'espéranto, et auteur d'études publiées entre autres en espéranto. [SAT-Amikaro / Service de Presse, n° 538, fév. 1999]

Fikcie

Sylvain Auclair

Oni ofte nomas la Esperantan verban formon *-us* la kondicionalon, laŭ la franca *conditionnel*. Tamen, la Esperanta uzo ne kongruas kun la franca. La *us*-formon oni uzas kiam la asertita frazparto ne estas vera, sed fikcia aŭ imaga. En la frazo: *Se mi estus riĉa, mi vojaĝus tra la mondo*, estas malveraj ambaŭ asertoj, ke mi estas riĉa, kaj ke mi vojaĝas. Same, en la frazo: *Li kondutas, kvazaŭ ŝi amus lin*, estas malvera la amo de ŝi al li. En ĉi lasta frazo, tute ne temas pri kondiĉo. Tial, pli bona nomo de la *us*-formo estas la *fiktiva* aŭ la *imaga* verbomodo.

Helpo al rifuĝintoj el Kosovo

Ni ekkonis pri du programoj celantaj helpi al la rifuĝintoj el Kosovo. La unua estas plenumata de la *Humanitara Organizo Espero*, en Sarajevo (Bosnio kaj Hercegovino). Ĝi celas disdonon de 1000 familiaj pakaĵoj, konsistantaj el bazaj nutraĵoj kaj higienaĵoj, kaj serĉas helpon de Esperantistoj por traduki la informon diskonigi ĝin al ne-Esperantistaj helpasocioj. Monon oni sendu al *Konto Esperanto de UEA, Agado 2^a*.

La duan programon plenumas la Albana Esperanto-Asocio, kiu celas helpi al rifuĝintoj nun loĝantaj en Albanio. Monon oni sendu al *Konto Esperanto, Agado 4^a*. Por ambaŭ agadoj, oni povas sendi ĉekon, kun la celo, al Sino Olga du Temple, 765 Braemar Avenue, North Saanich BC V8L 3S6.

La diligence...

l'avenir de l'espéranto.

Les autres disparaîtront dans l'oubli, comme tous les autres esprits rétrogrades qui doctement ont pronostiqué l'échec de tout ce qui régit aujourd'hui notre monde. [De *Espéranto Actualités — revue française d'espéranto*, n° 496, avril 1998]

6 Somero de 1999

MemkleriĜo

Sylvain Auclair

ou de *sidigi sin* (qui traduit littéralement *s'asseoir*).

D'un autre côté, le suffixe *-iĝ-* peut être affixé à un verbe transitif (c'est-à-dire un verbe pouvant avoir un complément direct) pour le rendre intransitif (les verbes en *-iĝi* n'ont jamais de complément direct). Ainsi, de **frakasi**, qui signifie *briser, rompre, fracasser*, on peut créer **frakasiĝi**, qui signifie *se briser, se rompre, se fracasser*. Remarquons que le sujet de **frakasiĝi** correspond au complément de **frakasi**: c'est la chose brisée. Et remarquons aussi que, lorsqu'on emploie **frakasiĝi**, on ne s'intéresse plus à la personne qui commet tous ces dégâts.

Souvent, on pourra traduire la forme *-iĝi* par un verbe pronominal: **vidiĝi**, *se voir*, **troviĝi**, *se trouver*... Il s'agira alors de verbes pronominaux ayant un sens passif, forme verbale avec laquelle *-iĝi* a quelque affinité.

[Pour écrire cette réponse, je me suis inspiré du *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* de Bertil Wennergren, que l'on peut consulter sous <www.esperanto.net/veb>]

Esperantisto ĉe la inaŭguro de la Kimra Parlamento

Unu el la membroj de Esperanta PEN-Centro estis invitita, pro sia nuna ofico ĉe regiona parlamento en Italio, al la inaŭguro de la nova, unufoje elektita, Kimra Parlamento, la 26^{an} de majo 1999. Dum la antaŭa bankedo, kiun partoprenis reĝino Elizabeta kun sia edzo, duko de Edinburgo, kaj sia filo, princo de Kimrio, li havis la okazon menciis sian Esperantistecon al princo Karlo, esprimante sian ĝojon ke PEN Club International akceptis Esperanton samtempe kiel la kimran, en 1993 en Santiago de Kampustelo: ambaŭ literaturaj centroj estis subtenataj de la prezidanto de la skota PEN, Paul Scott. Princo Karlo ankaŭ ĝojis pro la koincido, des pli ke li mem festparolados ne en la angla, sed en la kimra. Kio efektive okazis tri horojn poste, dum la inaŭgura ceremonio en Kardifo. [El *Heroldo Komunikas*, n^o 13]

NOREK 1999

Mary Hammersmith

La traditionnelle rencontre d'espérantistes de la Colombie-Britannique et du Nord-Ouest des États-Unis a eu lieu au début de mai.

Wally du Temple bonvenigis la ĉirkaŭ 30 partoprenantojn de la kaskadmontara regiono al NOREK 99 (Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco), kiu okazis en riĉe naturbenita loko norde de Viktorio sur la Insulo Vankuvero en Brita Kolumbio, de la 7^a ĝis la 9^a de majo. Krom la ŝtatoj kiuj enhavas la Montaron *Cascades*, ĉeestantoj venis el Brazilo, Kalifornio kaj Toronto.

La konferencejo, provizis amikan etoson en kiu prezenti temojn tiel diversajn kiel minoritata lingvo de Pollando, la kaŝuba, piedira vojaĝo laŭlonge de la sovaĝa marbordo de la insulo Vankuvero (en la parko *Pacific Rim*), bredspertoj de aglo-paro, kaj botela vojaĝo de mesaĝo de la insulo Vankuvero al la insulo Niihau en la Havaja insularo. Tiu lasta inspiris nin (per instigo de Olga du Temple, la preleganto) sendi sammaniere al la mondo enboteligitajn mesaĝojn en tiuj boteloj, kiujn ni helpis malplenigi ĉe bongusta kradrosta bankedo de salmo ĉe la golfludejo de la familio Du

Temple, *Ardmore*. Post la bankedo, Pedro Albeirice da Rocha el Brazilo prelegis kaj kantis pri la muziko aŭdata en sia lando.

Mallonga kunveno inter reprezentantoj de KEA kaj ELNA okazis dum estis pridiskutita la maniero enkonduki Esperanton en la lernejan sistemon de la landoj. KEA elektis kiel sian celgrupon hejmlernantojn. Ellen Eddy proponis, ke ni pludiskutu kunlaboradon dum la Instruista Seminario, kiu okazos ĉi-jare tuj post la landkongreso de ELNA en Sankta-Luiso.

Mankis al ni ĉi-jare Cathy Schulze kaj Anne Whittaker, kiuj ofte partoprenis NOREK-on. Dum honoriga ceremonio pri la du longtempe fidindaj Esperantistoj, Doris Wheeler prezentis memorigajn librojn kiuj enhavis fotojn kaj verkitajn memoraĵojn pri la du virinoj.

Ekskurso al la apuda Aviada Muzeo fermis la konferencon. Ciprian Jauca, prezidanto de KEA, invitis NOREK-on 2000 kunveni oktobre en la urbo Vankuvero. [*El Reta Bulteno de KEA*, n^o 5.14]

Ekzamenoj

La estraro de E.S.K. antaŭnelonge diskutis pri la ebleco oferti al siaj membroj ekzameniĝi por atesti pri sia Esperanto-kono. Tiu diskuto fontis el la anonco, ke la Kanada Esperanto-Asocio rezignis pri sia ekzamena servo kaj invitis la ekzameniĝemajn Kanadanojn uzi la servon de la usona ekzamena servo. Ties ekzamenoj tamen postulas la konon de la angla...

La estraro nun konsideras du eblecojn : ĉu traduki francen la usonajn ekzamenojn, kiuj povas funkcii poŝte, ĉu uzi la ekzamenojn de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiuj neprigas la konsistigon kaj ĉeeston de trimembra komitato. Kun ambaŭ solvoj, estos tri niveloj : baza, meza kaj supera. La supera nivelo postulas bonan konon pri la Esperanto-movado kaj -historio.

Café Esperanto, situanta laŭ strato Mont-Royal, en Montrealo, vendiĝis. Ĉar ĝi tamen tenadas sian nomon, estas verŝajne, ke ni plu renkontiĝos tie, fojfoje. Ni memoru, ke nek la antaŭa nek la nuna posedanto estas Esperantisto.

UEA kandidatigita por la Hilton-Premio

Universala Esperanto-Asocio estas kandidato por la ĉi-jara Humaneca Premio de Hilton, starigita de la Fonduso Conrad N. Hilton por « honorivoluntulan, karitatan au ne-registaran organizaĵon, kiu eksterordinare kontribuis al la mildigo de homa sufero ». La Fonduso portas la nomon de sia fondinto, la fama hotel-entreprenisto Hilton.

La Hilton-premio, unu miliono da usonaj dolaroj, estas la plej granda humaneca premio en la mondo. Lastatempe ĝi estis aljuĝita interalie al *Médecins sans frontière* kaj al *Opération Sourire*. La ĉi-jaran

laŭreaton oni anoncos jarfine.

La kandidatigon de UEA iniciatis S^{ro} Kent Jones el Usono. Li atentigis Fonduson Hilton, ke diference de la antaŭaj premiitoj, kies agado celis mildigi aktualan suferon, UEA per sia agado por internacia lingvo kontribuas al anticipaj mildigo kaj forigo de kaŭzoj, kiuj povas rezultigi au pligrandigi homan suferon. En la unua ekzameno pri la proponitoj la Fonduso trovis ankaŭ tian agadon kongrua kun la celoj de la premio, kaj sekve UEA estis akceptita kiel valida kandidato. Tion anoncis la kandidatiga direktoro Carolyn Gaspar. Fine de sia letero al

UEA ŝi skribis: « Fonduso Hilton laŭdas vin pro via valora filantropia agado kaj gratulas vin pro via kandidatigo ».

Kadre de Kampanjo 2000 komenciĝis la preparoj por denove kandidatigi UEA ankaŭ por la pacpremio de Nobel. Ekde la 50^a jaroj UEA estis kandidato jam multfoje. Plej proksime al la premio UEA estis en 1988. Laŭ gazetaraj informoj, UEA estis unu el la kvin kandidatoj, el inter kiuj la fina premiito estis elektita. [*El Gazetaraj komunikoj de UEA*, n^o 30].

Kalendaro de venontaj okazaĵoj

10^a de julio. Festivalo de **fiŝista supo**, en Baja (Hungario).
17^a ĝis 24^a de julio. 18^a **Katolika Esperanto-Tendaro**, en Srebrnice (Ĉeĥio).
24^a ĝis 27^a de julio. 47^a Landa Kongreso de **ELNA**, en Sankta-Luiso (MO).
24^a ĝis 31^a de julio. Kongreso de la **Sennacieca Asocio Tutmonda** en Karlovy Vary (Ĉeĥio).
31^a de julio ĝis 7^a de aŭgusto. 84^a **Universala Kongreso**, en Berlino (Germanio).
7^a ĝis 14^a de aŭgusto. Renkontiĝo de **Esperantistaj Familioj**. Apud Zielona Góra (Pollando).
8^a ĝis 14^a de aŭgusto. **Jogo kaj Esperanto** kun Rose-Marie Laveau, en Grésillon (Francio).
9^a ĝis 16^a de aŭgusto. 55^a **Internacia Junulara Kongreso**, en Zánka (Hungario). Temo : *Komunikado en la informocio*.
17^a ĝis 21^a de aŭgusto. **Multlingva staĝo** : inciado al diversaj naciaj lingvoj pere de Esperanto. Bouresse (Francio).
10^a ĝis 12^a de septembro. Unua **vinbera semajnfino**. En Edenkoben (Germanio).
26^a ĝis 29^a de oktobro. Tria Internacia Studenta Esperanto-Kongreso de **Azi-Pacifikaj Landoj**, en Vladivostok (Rusio).
10^a ĝis 15^a de decembro. **Zamenhofa semajno**, Bouresse (Francio).
27^a de decembro ĝis 3^a de januaro 2000. 16^a **Internacia Festivalo**, en Münster, kaj 42^a **Internacia Seminario**, en Wetzlar (Germanio).
27^a de junio ĝis 2^a de julio. 10^a Internacia Esperanto-Kongreso, en Istanbul (Turkio).
25^a de julio ĝis 1^a de aŭgusto. 85^a **Universala Kongreso**, en Tel-Avivo (Israelo).

13^a ĝis 20^a de aŭgusto. **Kultura Esperanto-Festivalo**, Finnlando.
Somero 2000. 56^a **Internacia Junulara Kongreso**, verŝajne en Honkongo.
21^a ĝis 28^a de julio 2001. **Universala Kongreso**, en Zagrebo (Kroatio).

Ni organizas

29^a de aŭgusto. **Mantenmanĝo** ĉe *La Boulange du Commensal*, 5043, rue Saint-Denis, metrostacio Laurier, 10h. **Ĝenelara kunsido** de la Esperanto-Societo Kebekia, samloke, 11h. Posttagmeze okazos vizito al la malnova kvartalo, kie okazos festivalo.
24^a de septembro. Kluba renkontiĝo, en la Montreala Esperanto-Domo. Temo : *ŝercoj kaj sociaj ludoj en Esperanto ; memoraĵoj pri la ĵusaj someroj*. 19h30.
9^a ĝis 11^a de oktobro. Aŭtuna renkontiĝo en **Okemo** (Ludlow VT).
23^a de oktobro. Vizito al **Musée des Beaux-Arts** de Montréal. Renkontiĝo je la 14^a horo, ĉe 1380, rue Sherbrooke Ouest, metrostacio Peel.
19^a de novembro. Kluba renkontiĝo en la Montreala Esperanto-Domo. Temoj *ne* politically correct-aj : *mortpuno, abortigo, rilatoj inter Kebekianoj pradevenaj kaj novdevenaj, progreso aŭ malprogreso de Esperanto*. 19h30.
18^a de decembro. **Zamenhofa festo**, en la Montreala Esperanto-Domo. Komuna vespermanĝo. 18h.

Ni plezure respondos demandojn pri la supraj (kaj aliaj) okazaĵoj : (514) 272-0151 aŭ LaRiverego@esperanto.nu.

Ideo ligita al juneco

Henri Masson

Suite d'une *courte* recension d'espérantistes célèbres, ayant appris l'espéranto dans leur jeunesse, voire leur enfance. L'espéranto, seul projet réussi de langue planifiée, est aussi le seul à avoir été créé par un jeune...

Eugen Wüster naskiĝis en 1898 en Aŭstrio. Jam en 1917 aperis de li tradukoj el la rusa kaj germana en Esperanton, do kiam li estis 19-jara. Li famiĝis tutmonde sur la kampo de normigo kaj apartenis al organizoj por Internacia Normigo.

La usona Nobelpremiito pri ĥemio 1954, kaj pri paco 1962, **Linus Pauling** (1901-1994) eklernis Esperanton en la aĝo de 15 jaroj. Kiam li estis 90-jara, li sciigis al Kent Jones, konata aktivulo el Ĉicago, ke li povis legi Esperanton sen ĝeno kvankam li ne uzis ĝin dum 75 jaroj.

Einar Dahl (1904-1979) lernis Esperanton en 1921, do 17-jara, kaj tuj aktivis en la enlanda kaj internacia movado. Li fariĝis eminenta figuro de la sveda politiko kiel parlamentano kaj senatano dum 18 jaroj. Li estis influa kaj intervenis i.a. por ke UEA estu proponita por la Nobelpremio. Li aktivis kun aliaj por akceptigi en la Sveda Parlamento komunan skandinavon klopodon por ke UNESKO enketu pri la demando de internacia komunikilo.

Evgeni Aisberg naskiĝis en 1905 en Odeso kun rusa nacieco. Li eklernis Esperanton en 1919, do 14-jara. Li loĝis en Parizo ekde 1925 kie li tuj fariĝis ĉefredaktoro de fakaj revuoj pri radio kaj televido. Samjare li jam fondis kun Pierre Corret la Esperantlingvan revuon *Internacia Radio-Revuo* de kiu aperis 14 numeroj. Inter la plej famaj kaj popularaj libroj kiujn li verkis estis lia originale verkita en Esperanto *Mi komprenas fine la radion* poste tradukita kaj publikigita en pli ol 20 lingvoj. Li fondis la unuan eŭropan revuon pri televido kaj la Francan Asocion de Televido. Li fariĝis direktoro de la franca radiofako de la Internacia Instituto de mikrofonaj studoj. Estas interese ke ankoraŭ nun, la fama pariza eldonejo *Dunod* publikigas kolekton kiun kreis Evgeni Aisberg en 1934 sub la titolo *Mais c'est très simple*. Depost 1958, li estis prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Radioteknika kaj Elektronika Informado kaj honora membro de la Instituto de Elektraĵ kaj Elektronikaj Inĝenieroj. Li mortis en 1980.

Daŭrigota